

# BULGARA

3 • 1981

# ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





Lernantoj de V klaso ĉe Baza Lernejo „Mitko Palauzov“ en u. Svoĝe lernas E-on en studrondo ĉe la Junpionira Domo. Kursgvidantino: Radenkova.

#### Redakta komitato:

Dončo HITROV (ĉefredaktoro), Marin BACEV, Vasil BOROVSANI, Dimităr DENČEV, Evĝeni GEORGIEV (sekretario), Dimităr HAĜIEV, Krástju KARUCIN, Ĥaim LEVI (viceĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi GAREV

Korektis: Evĝeni GEORGIEV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919 j.  
Eldonkvanto 6 100.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,

1303 Sofio, Bulgario

tel. 32-40-68, 31-00-29

P. K. 68

1000 Sofio

## ENHAVO

|                                                                                                |       |
|------------------------------------------------------------------------------------------------|-------|
| L. I. Breĵnev. Por la bonstato de la popoloj, por daŭra paco! . . . . .                        | 1     |
| T. Jivkov. Parolo pri la partio de Lenin. . . . .                                              | 2     |
| * * * La popolo diskutas sian estontecon. . . . .                                              | 3     |
| M. Conkovski. Sofia E-societo „M. Gorkij“ pridiskutas sian unujaran agadon. . . . .            | 4     |
| Cv. Todorov. E-societo „Vekiĝo — 75-jara D-rino Tjuran Omer.“ Aktiva E-agado en Loveĉ. . . . . | 5     |
| * * * Internacia E-ŝakarango en Varna. . . . .                                                 | 6     |
| Ĥr. Manolov. Ĥristo Kozlev — poeto-esperantisto. . . . .                                       | 7     |
| N. Mitrev. Ivan Garvanov — ĉiam viva. . . . .                                                  | 7     |
| D-ro G. Georgiev. La komenco. . . . .                                                          | 8     |
| N. Janev. „Apostolo de libereco“ en E-o. . . . .                                               | 9     |
| * * * E-kinoklubo restarigota. . . . .                                                         | 10    |
| D. Denčev. Belarta ekspozicio de V. Bårdarov. . . . .                                          | 10    |
| P. Batoeva. La ĝardeno de la revoj. . . . .                                                    | 11    |
| A. Kubulnieks. La plej dolĉa belo. . . . .                                                     | 11    |
| * * * Verdaj Steletoj. . . . .                                                                 | 12    |
| I. Sergiev. Velingrada ĉesto en Hungario. . . . .                                              | 12-13 |
| P. Arnaudov. Historioj notoj pri kalkultekniko. . . . .                                        | 14    |
| * * * Salutleteroj al sovetaĵ jubileuloj. . . . .                                              | 15    |
| * * * Tra Sovetunio. . . . .                                                                   | 15    |
| L. Hernandez. Hispana E-muzeo. . . . .                                                         | 16    |

Sur la kovrilpaĝo: Aŭtomatiko signifas progreson! (En unu el la haloj de la teksa fabriko „Bulgario“ — Sofio).

## NIAJ PERANTOJ

Britio, Covenham Louth, Lines, LN 11 OPF

Laycroft Main Road, s-ro Paul Hewitt

Ĉeĥoslovakio, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, 110 00 Praha 1.

Ĉeĥoslovakio, 040 01 Košice, Šmermova 35/1, Esperantisto Slovaka, Daniel Papak

Franco, F-54510 Tomblaine, B. P. 23,

s-ro Roger Degrelle

ĝirkonto 771.77 R, NANCY

Jarabono 20. — f. f.

Finnlando, PL 221, SF 70 101, Kuopio 10,

Finna Esperanto-librejo

Germana Demokratia Respubliko,

DDR 108 Berlin, Charlottenstr. 60,

Centra Laborrondo Esperanto

Germana Fed. Respubliko, Esperanto-eldonejo Palatina

kkir Iggebach, Schlossgasse 30, poŝtekkonto n-ro 1658

48-678 ISHFN D-6731 Elmstein — Jarabono: 8 gmk.

Hispanio, Adonis Gonzales Meana

str. Marcelino González, 5-49-Dcha.

Gijon (Asturias)

Jarabono: 300 ptoj

Hungario, „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443 Budapest

Kubo, Ciego de Avila,

apartado 223, Pedro P. Lamas Diaz

Nov-Zelando, N. Z. Esperanto Asoc. box dept. 180

Onepu RD, Lyaal Bay Wellington.

Portugallio, Portugala Esperanto-Asocio, R. DR. Joao

Couto, 6 R/C. A P — 1500 Lisboa

Jarabono: 260 eks.

Sovet-Unio, 200016 Tallinn, Estonio, do vostrebovanija

Johannes Palu

Jarabono: 5 rubloj

Vjetnamio, Hanoi, 222 D01 Can,

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio





## XXVI KONGRESO DE KPSU

**POR LA BONSTATO DE LA POPOLOJ, POR DAŬRA PACO!****EL LA ELDIRO DE L. I. BREĴNEV EN LA KONKLUDA****KUNVENO DE LA KONGRESO**

Jam pasis ok tagoj' kiuj eniros la historion de la Partio kaj de nia lando. Ok tagoj de streĉa laboro de la XXVI Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio.

Estis akceptitaj decidoj, kiuj difinas multflanke la vojon de nia popolo por la sekvontaj kvin jaroj — eĉ por pli longa periodo. Grandaj kaj kompleksaj faroj, respondecaj kaj tute ne facilaj taskoj staras antaŭ la sovetaj komunistoj kaj ĉiuj sovetianoj.

Prilaborante niajn planojn por la estonteco, ni starigas al ni mem antaŭ ĉio du ĉefajn, simplajn kaj klarajn celojn: la bonstaton de la popolo kaj la longdaŭran pacon. La XXVI Kongreso de KPSU konvinke rekonfirmis tion.

Vi revenos en viajn landojn kaj vi daŭrigos vian noblan agadon. Tute malsamaj estas la kondiĉoj, ĉe kiuj ĝi efektiviĝas. Tamen nin ĉiujn unuigas la fideleco al la idealoj de la justeco, la libereco kaj la feliĉo de la laboruloj. Kaj, kompreneble, ankaŭ la arda fideleco al la afero por konservo kaj plifirmigo de la paco sur la terglobo.

Miaopinie nia kongreso klare montris, ke la sovetaj komunistoj konscias sian internacian respondecon pri la batalo por tiuj noblaj celoj.

La novaj gravaj pacamaj iniciatoj, kiujn nia kongreso aprobis, elokvente parolas pri nia persista kaj senlaca batalo por liberigi la popolojn de nova mondmilito kaj de la ŝarĝo de la vetarmado. Ni estas konvinkitaj, ke ili ricevos la aktivan subtenon de ĉiuj prudentaj fortoj en la mondo.

Konklude, mi deziras vin kredigi, ke la Komunista Partio de Sovetunio ankaŭ estonte faros ĉion, por ke estu pli firmaj la amikeco



kaj la solidareco, kiuj nin ligas kun la popoloj de la frataj socialismaj landoj kaj kun la laborulaj amasoj el ĉiuj landoj.

Ni batalu:

— por la granda faro — la libereco de la popoloj kaj la sociala progreso de la homaro!

— por novaj sukcesoj en la plifirmigo de la malstreĉiĝo, en la bridigo de la vetarmado kaj la fortikiĝo de la monda paco!

# PAROLO PRI LA PARTIO DE LENIN

TODOV JIVKOV

UNUA SEKRETARIO DE CK DE BULGARA  
KOMUNISTA PARTIO, PREZIDANTO DE LA  
ŜTATA SOVETO DE PR BULGARIO

Depost kiam la marksismo, estiĝinta supro de la socia konscio de la homaro, starigis al si la aŭdacan taskon „transformi la mondon“, kaj la laborista movado akceptis kiel sian armilon la sciencon socialismon, centra problemo de la socia progreso estiĝis la neceso de politika partio, kapabla gvidi la revoluci-transforman agadon de l'amasoj, direkti ilian historian kreadon.

En Moskvo estis kunvokita la XXVI kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio. Ne nur por la komunistoj de la sovetlanda, sed ankaŭ por la komunistoj de la tuta planedo ĉiu kongreso de KPSU estas grava evento.

Tiu ja estas tute natura, ĉar KPSU okupas specialan lokon en la internacia komunista movado.

Menciante tion, ni tute ne volas diri, ke KPSU posedas iun „direktantan rolon“, pri kiu niaj ideologiaj kontraŭuloj, celantaj diskrediti la tutan komunistan movadon, provas kulpigi ĝin.

Laŭ la normoj, akceptitaj de la komunistoj en la tuta mondo, KPSU estas egala inter egalaj. Sed menciante ĝian specialan lokon inter la komunistaj partioj tutmonde, ni deziras substreki ĝian altan aŭtoritaton, la realan influon de ĝia sperto al la ceteraj komunistaj partioj, ĝian realan kontribuon al nia komuna farto.

La partio de Lenin, la unua en la historio de la homaro kondukis sian popolon al venka socialisma revolucio. Tiu ĉi venko estis la komenco de praktika realigo de la ideoj de scienca socialismo, pruvis al la popoloj la eblecon pri ilia triumfo super la tiranoj, pri ilia kapablo konstrui libere sian vivon — sen ekspluatantoj, sur novaj, nekompareble pli justaj principoj.

La partio de Lenin estis la inspiranto kaj la organizanto de la abnegacia batalo de la sovetlanda popolo kontraŭ la nigraj fortoj de faŝismo, kiuj deziris realigi tutmondan hegemonion kaj konkeris preskaŭ tutan Eŭropon.

Sub la gvidado de KPSU la sovetlanda popolo donis sian decidan kontribuon por la frakaso de faŝismo, savis el ĵugo kaj fizika neniiĝo multajn popolojn, inkluzive la bulgaran popolon.

Ĉu oni povas imagi kiel aspektus hodiaŭ la homaro, se tiu glora heroaĵo ne estis farita?!

Nur tiuj tri faktoj, difinintaj la sorton de la homaro kaj por eterne enskribitaj en ties historio, estas sufiĉaj, por ke ni komparu KPSU kun Prometeo de la nova jarcento — la jarcento de socialismo kaj komunismo.

La Komunista Partio de Sovetunio unua devis solvi la fundamentajn teoriojn kaj praktikajn taskojn pri kreado, formigo kaj disvolvo de novaj produktadoj kaj sociaj rilatoj, de nova vivstilo. Estis ellaborita kaj praktike realigita la ideo de Lenin pri politiko de paca konekzistado inter landoj kun malsama sociordo kaj pri helpado al la popoloj, batalantaj por sia nacia kaj socia liberigo.

Tiuj tre komplikaj, dialektike malkonsekvencaj taskoj, estis realigitaj ĉe treege malfacilaj kondiĉoj.

Nun KPSU estas deksepmiliona avangardo, gvidanta la kreaĵon agadon de la multnacia sovetlanda popolo laŭ la vojo de nekonata ĝis nun epokfara supreniro. Armita teorie, bonege organizita, ligita nedisiĝebla kun la amasoj, inspirita de la internaciismo — tiuj ĉi ecoj de partio de nova tipo, motivitaj iam de Lenin, hodiaŭ estas pliriĝigitaj kaj maturaj. KPSU estas partio evoluinta, partio de nova tipo, marksisma-leninisma partio de nia epoko, partio konforma al la socio de la disvolvita socialismo.

Por ni, la bulgaraj komunistoj, la ĉiutaga subteno al la partio de Lenin en la realigo de ties nobla historia misio, estas demando de honoro kaj devo. Ni sentas nin viglaj kunpartoprenantoj en la batalo de KPSU por socialismo en la mondo. Tial nia parolo pri ĝi estas ĉiam sincera kaj pasia.

Ni estas konvinkaj: la decidoj de la XXVI Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio donos novan potencon stimulon por la venka supreniro de la socialismo, de la movadoj de ĉiuj plej bonaj fortoj de la planedo, batalantaj por paco kaj socia progreso.

El artikolo, publikigita en revuo „Problemoj de la paco kaj socialismo“ — 2/1981





## LA POPOLO DISKUTAS SIAN ESTONTECON

La socialisma demokratio estas fundamenta trajto de la socialisma vivmaniero. Kiel vera mastro de sia sorto, la bulgara popolo partoprenas aktive la diskutadon kaj la akcepton de pluraj gravaj kaj respondecaj politikaj ŝtataj dokumentoj.

Jam pli ol unu monato en nia lando okazas tutpopola diskutado de la projekto-tezaro de la XII kongreso de la bulgara Komunista Partio pri la agado de la partio por socia, ekonomia kaj kultura evoluo de Popola Respubliko Bulgario — kaj pri la efektivigo de taskoj de la oka kvinjarplano (1981—1985) kaj ĝis 1990.

Tiu diskutado havas siajn profundajn motivojn pro la fakto, ke la prijuĝo de la atingitaj rezultoj ankaŭ la projektoj por estonta evoluo de la lando povas esti efektivigataj plej trafe, se ĝi estas rezulto de kolektiva kompetenteco de la tuta laborista klaso kaj de diversaj agrikulturaj, sciencaj, artkreaĵ agantaj kaj de la cetera popola intelektularo.

La diskutado de projekto-tezaro de la XII Kongreso estas nova elstara atesto pri nia socialisma demokrateco, pruvo pri la firmaj ligoj, inter la popolo kaj ĝia gvidanta forto — la Bulgara Komunista Partio.

En la antaŭkongresaj tagoj la bulgara popolo diskutas la eksteran kaj la internan politikon de sia ŝtato, la socian, ekonomian kaj kulturen politikon de la socio. La aktiva partopreno en tiu diskutado de la milionoj da civitanoj — kaj inter ili de la bulgaraj esperantistoj — kontribuas al la pliriĉigo de la grandioza programo, kiu estos akceptita en la venonta partia kongreso.

En la projekto-tezaro la atenton altiras analizo de la internacia situacio, de la internacia partia kaj ŝtata agado. Per sia aktiva kaj pacama politiko sur la internacia areno Bulgario okupas indan lokon en la batalo por firmigo de la paco, por plua profundigo de la

kunlaboro kaj komprenigo inter ĉiuj popoloj de la mondo.

Nun la rolo de Bulgario en la internacia vivo sukcese kreskas: ĝi havas diplomatajn rilatojn kun 116, komercajn — kun 112 kaj kulturajn — kun 132 landoj. Bulgario disvolviĝas en amikeco kun Sovetunio kaj la socialismaj landoj, kun la aliaj landoj, havantaj diversan sociordon, sur la principoj de la paca kunekzistado.

Grandiozaj estas la rezultoj, atingitaj en la lastaj jaroj; sufiĉas menci, ke dum la pasintaj 10 jaroj la bulgara popolo „kreis“ du novajn Bulgariojn! Aspektas kiel fantazio, sed efektive la fundamentaj fondusoj je la fino de 1980 atingis 77 miliardojn da levoj — aŭ pli ol duoble kompare kun 1970. Dum la pasintaj 5 jaroj la industriaj produktaĵoj kreskis per 35%.

Dum la periodo 1981—1985 la nacia enspezo kreskos per 25—30% dum la naŭa kvinjarplano — per 20—25%. La industriaj produktaĵoj kreskos per 30—35% kaj rezulte de tio altiĝos la vivnivelo de la laborantoj. Sufiĉe estas menci, ke nur dum la oka kvinjarplano oni konstruos novajn 400 000 loĝejojn, kaj dum la naŭa kvinjarplano — 450 000!

La bulgaraj esperantistoj ne postrestos en tiu socia aktivado. En ĉiuj lokoj kaj fakoj, en ĉiuj sferoj — en uzinoj, lernejoj, en kulturaj kaj sciencaj institutoj — ili per siaj konceptoj kaj praktika agado donas sian kontribuon por firmigo de tiu direkto.

Dum tiu socia aktiveco plifirmigos la unueco inter la Partio kaj la popolo, en la spirito de la aprila linio plilargiĝos la socialisma demokratio.

La bulgaraj esperantistoj kiel veraj patriotoj kaj internaciistoj subtenos per ĉiuj siaj fortoj la realigon de la planitaj taskoj, kio provokos profundajn kvalitatajn ŝanĝojn en la socia, ekonomia kaj spirita evoluo de la socialisma Bulgario.

## **SOFIA E-SOCIETO „MAKSIM GORKIJ“ PRIDISKUTAS SIAN UNUJARAN AGADON**

La sofiaj e-istoj rajtas fieri pri sia membreco en la urba E-societo „Maksim Gorkij“ — unu el la plej multnombraj en nia lando kaj en la mondo — en ĝi membras 634 esperantistoj! Simpla komparo povus nin konvinki tiurilate: laŭ la jarlibro de UEA de 1980 en Svislando, kie okazis la 64a Universala Kongreso de Esperanto, estas nur 300 organizitaj e-istoj, dume en Nederlando, kie troviĝas la Centra Oficejo de UEA — nur 600 esperantistoj!...

Ni aldonu ankaŭ, ke la sofia urba E-societo estas unu el la plej aktivaj kaj reprezentaj en nia lando; societo, en kiu membras elstaraj kaj tutmonde konataj e-istoj.

Je la 11a de februaro k. j. vespere la klubejo estis malvasta akcepti ĉiujn venintojn ĉeesti la jarkunvenon de E-societo „M. Gorkij“. En la prezidantaro okupis lokojn membroj de la CE de BEA, de la UE kaj DE de BEA, estraranoj de „M. Gorkij“, E-veteranoj k.a.

En sia arte kaj bonstille preparita raporto la prezidantino de la societo k-dino Belka Beleva detale kaj objektivite priskribis la unujaran agadon de la estraro kaj de la membraro. Si ankaŭ esperimis sian varman dankon al ĉiuj aktivuloj por ilia sindona laboro kaj kontribuo al la efektivigo de la multflanka jara laborplano de la societo. Membroj de „M. Gorkij“ partoprenis la Mondan Pacforumon — la Parlamenton de la popoloj por paco, okazintan en Sofio; estis organizitaj renkontoj kun delegitoj de la pacparlamento — membroj de MEM, kun verkistoj-partoprenintoj en la Tria Internacia Renkonto de la Verkistoj en Sofio. Ni okazigis regule solenajn celebroy de gravaj datrevenoj. La tuta agado de la societo estis direktita celkonforme al la 1300a datreveno ekde la fondiĝo de la bulgara ŝtato. Amasa estis la partopreno de la sofiaj esperantistoj en la 40a jubilea nacia



**La prezidantino Belka Beleva raportas pri la unujara agado**

E-kongreso en Plovdiv kaj en ties riĉa programo.

Dank'al la vigla propagando de la Internacia Lingvo en diversaj institucioj (entreprenejoj, uzinoj, lernejoj k.a.) estis organizitaj kursoj por komencantoj kaj por progresintoj, kiujn partoprenis kaj sukcese finis 151 kursanoj. Tiu ja estas nova rezervo por pliriĝo de la societa membraro kaj la E-movado en nia ĉefurbo.

Tre favore disvolviĝas niaj rilatoj kun la ĝemela E-klubo en Leningrado: interŝanĝo de diversaj bildmaterialoj, vigla korespondado kun la klubanoj ktp. La societa estraro intencas oficiale inviti la Leningradan E-Klubon gastigi en nia lando okaze de la solenaĵoj lige al 1300-jariĝo de nia ŝtato en urbo Ŝumen.

Ĉiuj partoprenintoj en la diskutado de la unujara aktiveco de la societo „M. Gorkij“ substrekiĝis ĝian viglecon, same kiel la personan kontribuon de ĝia prezidantino Belka Beleva, kiu estis vere „motoro“ de ĉiu iniciato, de ĉiu aranĝo. Tute meritaj estis la dankaj vortoj, direktitaj al ŝi kaj al ŝiaj kolegoj-samestraranoj. Modestaj, sed tutsinceraj estis la donacoj, per kiuj la membroj de la societo esprimis sian estimon al la estraro kaj sian dankon por la riĉenhavaj kaj utilaj programoj, efektiviĝitaj dum la pasinta jaro.

La novakceptita rezolucio por la estonta agado enhavas 15 ĉefajn taskojn, celantaj la pliriĝigon de la instrua laboro, la plimultiĝon de la membroj kaj diversflankan societan aktivadon.

La sofiaj esperantistoj estos denove en la unuaj vicoj de la aktivaj E-societoj en nia lando, pretaj por novaj kontribuadoj al disvastigo de la Internacia Lingvo.

**M. Conkovski**



## E-SOCIETO «VEKIĜO» — 75-JARA

La 29an de januaro ĉ.j. La ŝumenaj e-istoj kaj amikoj de la Internacia Lingvo solene selebris la 75an datrevenon ekde la fondiĝo de societo «Vekiĝo» en Ŝumen. Raporton pri la 75-jara kultura, patriotisma, internacisma kaj porpaca agado de la societo voĉlegis ĝia prezidanto Cv. Stojanov.

Tre kortuŝaj estis la salutparoladoj. En la nomo de BEA k-do Kr. Karucin salutis la membrojn de la

La Esperanto-societo „Vekiĝo“ en Ŝumen aktivis jam 75 jarojn! Ĝi estas unu el la plej malnovaj E-societoj en Bulgario, fondita ĉe legejo „Dobri Vojnikov“. La junaj kaj entuziasmaj societanoj brodis verdan silkan standardon, konservitan ĝis nun.

La societo fariĝis faktoro en la bulgara E-movado. La esperantistoj de Ŝumen senlace laboradis por disvastigo de la Internacia Lingvo inter laboristoj, metiistoj kaj intelektuloj.

Post la Naŭa de Septembro 1944 la unua libera E-kongreso, okazinta en 1945 vekis la novan vivon de „Vekiĝo“.

La vera supreniro de la societo „Vekiĝo“ komenciĝas de 1955 jaro. La nova societa prezidanto Nikola Pärvanov (samtempe sekretario de la Urba Komitato de la Bulgara Komunista Partio) kaj pli poste Canko Karaspaŝov kaj Atanas Bojagiev kontribuas por ĝia fortigo. La agadon de la societo oni akordigas

societo-jubileulo. Li enmanigis honoran insignon de la Asocio al la esperantistoj-veteranoj Rajna Kasabova — rekonita lektoro kaj Ivan Smokov — vicprezidanto de «Vekiĝo». Ses aliaj membroj estis distingitaj per oraj kaj argentaj insignoj.

Entuziasme estis renkontita la decido de la Plenuma Komitato de la Komunuma Popola Konsilantaro pri honorigo de la Societo per „Honora Signo“ de urbo Ŝumen por ties multjara populutila agado.

kun la taskoj kaj problemoj de la Komitato por Defendo de la Paco, la Komitato de la Demokrataj Virinoj, la Junulara Unuiĝo, kaj la Patrolanda Fronto. Ekde aŭgusto 1956 komenciĝas la pliamasigo de la societo. La 26an de majo 1957 estas organizita la Dua Konferenco de la esperantistoj el Nord-orienta Bulgario. La sekvan jaron „Vekiĝo“ alvokas la esperantistojn el la tuta mondo por subteni la decidojn de la Monda Packonsilantaro.

Dum sia 75-jara agado „Vekiĝo“ estas ĉiam sinsekva batalanto por socia justeco, edukanta siajn anojn en spirito de internaciismo kaj frateca unueco.

Pro sia multjara populutila, patriota kaj internacia agado por paco la esperantistoj el Ŝumen ricevis altrangan ŝtatan premion — la ordenon „Kiril kaj Metodi“ — I grado kaj Oran medalon por Paco de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco.

Cvjatko Todorov

## AKTIVA E-AGADO EN LOVEĈ



En la jarkunveno de la klubo de e-istoj ĉe la sindikata kulturdomo partoprenis klubanoj kaj gastoj el ĉiuj E-societoj en distrikto de Loveĉ, ankaŭ el urbo Plevne, Karlovo kaj Sofio. Honora gasto estis la heroo de la socialisma laboro k-do Ivan Kucarov.

La prezidanto de la klubo k-do Coĉo Kolarov raportis pri riĉa unujara agado de ĉiuj E-societoj en Loveĉ: urba societo „Espero“, medicina societo „D-ro Zamenhof“ kaj societo ĉe, maŝinkonstrua uzino „Balkan“.

La sekretario de BEA Dimitar Papazov faris vastan parolon kaj fiksis urbon Loveĉ centron de aktiva nacia kaj internacia E-agado en tiu ĉi regiono. Oni pridisku-

tis interesajn projektojn pri organizado de somera kaj aŭtuna E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj en vilaĝo Borima kaj de internacia arkeologia brigado en vilaĝoj Dobrodan kaj Debevo sub aŭspicio de UNESKO. Oni eldonos broŝuron pri la laboraj ritoj en la socialismaj landoj kaj estos daŭrigata la eldonado de la kluba bulteno. La riĉenhava jara laborplano antaŭvidas organizadojn de kantgrupoj kaj rondon de belarta E-parolo, efektiva de ligoj kun similaj kluboj en nia lando kaj ankaŭ en Sovetunio, Pollando, Hungario k.a., kun reciproka gastado.

Atendas nin obstina kaj vigla agado.

D-rino Tjuran Omer

## INTERNACIA ESPERANTISTA ĜAK-ARANĜO EN VARNA

Okaze de la 1300a datreveno de la bulgara ŝtato la Ĝak-sekcio de Bulgara E-Asocio kune kun Internacia Esperanto-Kursero organizas internacian esperantistan Ĝak-aranĝon de 16a ĝis 29a de julio 1981 en Varna. La aranĝo inkluzivas kelkajn eventojn, la plej grava el kiuj estos „Open“-turniro sen limigo de la nombro de partoprenantoj — laŭ Svisa sistemo, en 9 rondoj. Estas antaŭviditaj ankaŭ simultanseanco, konkurso pri solvo de Ĝak-problemoj, teama kaj individua fulm-rapidaj turniroj. Estos aranĝita riĉa kultura kaj turisma programo, ligita kun la glora datreveno.

Lasta limdato de aliĝo: 15a de majo.

Informojn petu de Internacia Esperanto-Kursero, p. k. 791, 1090 Sofio.



Sur nia foto:

Ĉe E-societo „Roza valo“ — u. Kazanlak jam funkcias Ĝak-grupo. Ties gvidanto estas Gane Jordanov. En la klubo esperantistoj-Ĝakdantoj lernas Ĝakan teorion, praktikas la amatan ludon.

**Smoljan.** La e-istoj el societo „Kulturo“ raportis pri sia unujara agado dediĉe al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. En sia parolado k-d-o Rumen Bukov, prezidanto de la societo, emfazis, ke pli ol 40 personoj sukcese finis E-kursojn, kaj 5 instruistoj — Internaciajn E-kursojn por instruantoj en Varno. Bonaj rezultoj estis atingitaj ankaŭ en la foresta lernado de E-o. La smoljanaj e-istoj korespondis aktive kun siaj leteramikoj el diversaj landoj. Por la perfektigo en E-o aparte kontribuis la amatora art-agado.

En la akceptita laborplano de „Kulturo“ por 1981 j. oni antaŭvidis varian agadon. Estos celebrataj gravaj por nia lando jubileoj — 1300-jara datreveno de Bulgario, 90 jaroj ekde la fondiĝo de BKP k.a.

Post la kunveno la ĉeestantoj spektis la filmon „Survoje de la amikeco“ de kinoklubo „Evridika“ ĉe DE de BEA — Smoljan.

M. Vasileva

**Asenovgrad.** Tute neatingebla ŝajnis la kontrolcifero 120 abonoj de E-Societo „David Sasonov“ al la asocia organo „BE“. Post aktiva abonkampanjo ni ĝoje komunikas, ke la starigita plano estas superplenu-

mita. 124 abonoj por la kuranta jaro! Tio konvinke atestas pri la vigo en la vicoj de nia societo.

Ĝojiga evento por la membroj de E-Societo „David Sasonov“ estis la akiro de propra klubejo. Ni aparte dankas pro la subteno de la vicprezidanto de la Urba Soveto Kâlvaĉev kaj la prezidanto de la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto Demireva.

En la enirejo de la klubejo estas aranĝita E-ekspozicio. Multe da materialoj kaj fotoj alvokas la novajn e-istojn al serioza kaj obstina lernado de E-o.

Ŝinka Filaretova

### Ruse. „RUSENSKI KOOPERATIVEN HORIZONT“

2a jaro, n-ro 1/1. 1. 1981, Ruse.

Dumonata bulteno de la Distrikta Kooperativa E-Grupo (OKEG) ĉe la Distrikta Estraro de Bulgara E-Asocio kaj ĉe la Distrikta Kooperativa Unuiĝo.

Kiam mi ricevis de la ĉefredaktoro de „BE“ la taskon menciigi nur per kelkaj linioj pri la jam dujara ekzisto de tiu modesta bulteno, mi ekpensis, ke temas nur pri kooperativa agado, kiu apenaŭ havas ion komunan kun la Internacia Lingvo. Tamen kiam mi rapide tralegis ĝin, min surprizis la fakto, ke E-grupoj sukcesis uzi sur du grandformataj paĝoj la vorton E-o (kaj ties derivaĵojn) pli ol 30-foje!

Cu estas alia pli bona nacilingva varbilo por E-o?

Se vi volas ekscii pri la jara agadplano de la Distrikta Kooperativa Unuiĝo en Ruse kaj uzi ties ekzemplon, se vi volas konatigi kun la interesa kaj varia enhavo de la bulteno, skribu tuj al la jena adreso: 7005 Ruse, bloko „Babuna“ A-23, Bulteno „R. K. Horizont“ kaj vi ricevos ĝin senpage.

Marin Băceve

**V. Bratanica (distrikto de Pazarĝik).** En lernejo „Hristo Botev“ oni organizis E-kurson por komencantoj. Gvidanto de la kurso estas la instruisto Atanas Dimitrov el vilaĝo Ljahovo.

Kun ĝojo kaj intereso regule vizitas la kurson gelnantoj el kvara, kvina, sesa kaj sepa klasoj. Ĉiuj gekursanoj fariĝos membroj de lerneja E-societo, kiun ili fondos post la ekzamenigo.

**Botevgrad.** Tre viglan instruagadon okazigis E-societo „Trifon Hritovski“ en Botevgrad ekde la komenco de la kuranta juro. Je la fino de januaro 21 gekursanoj sukcese finis E-kurson — I grado.

La ekzamenkomisionon prezidis d-ro Stojan Moraresku, respondeculo pri instrulaboro ĉe la Distrikta Estraro de BEA. Ĉiuj gekursanoj montris bonan konon de E-o. Ili sukcese estas la plej bona rekomenco por ilia instruisto Vanko Bărdarov, kiu daŭrigas la E-instruadon en novaj kursoj por progresintoj.

**Ajtos.** En la aŭtuno de 1980 la Distrikta Estraro de BEA en Burgas decidis helpi por revivigo de la E-societo en u. Ajtos. Entuziasme ekgvidis kurson por komencantoj Elena Stojkova el Burgas, kiu veturas al siaj gekursanoj por ĉiu leciono. Surbaze de tiu kurso estiĝis ebla la restarigo de la E-societo en la urbo.

Al la refonda kunveno venis el la Distrikta Estraro gek-doj Radka Lazarova kaj G. Stojkov. Ĉeestis ankaŭ k-dino Elisaveta Agenova — sekretario de la Urba Komitato de BKP. Si varme salutis la fondintojn kaj bondeziris sukcesojn al la nova E-Societo „Aglo“.

Kiel prezidantinon oni elektis Nedjalka Aleksieva.

Atanas Dimitrov

## heroa pasinteco

### HRISTO KOZLEV — POETO-ESPERANTISTO

Je la 23a de januaro en la Kultura Domo de u. Polski Trámbes okazis amasa solenaĵo dediĉe al Hristo Kozlev — kontraŭfaŝisma batalanto-partizano, talenta poeto kaj aktiva esperantisto.

Ĉeestis la prezidanto de CE de BEA Hristo Gorov, la sekretario de la Urba Komitato de BKP Ilija Dimitrov, la prezidantino de la Urba Konsilantaro de Patrolanda Fronto Veneta Boškova, kulturaj agantoj, civitanoj, gastoj el najbaraj loĝlokoj.

K-do Gorov faris emocian paroladon pri la vivo kaj la agado de Hristo Kozlev. „Se Hristo Kozlev ne estis pereinta tiel frue sub la terura bato de la morto, — diris li, — nun li estus en la vicoj de niaj plej talentaj poetoj, inter la plej fidelaj adeptoj de nia nobla E-agado. Eĉ nur la konata parto de lia verkaro sufiĉas, por ke li estu honorata kiel ekzemplo de sindona kaj brava antifaŝisto, poeto kaj esperantisto. . .“

Kiel daŭrigo de la parolado eksonis la entuziasmaj paroloj de Stefan Stefanov, Katja Hristova kaj Plamen Jordanov — membroj de la komsomola klubo „Juna Literaturisto“.

### IVAN GARVANOV — ĈIAM VIVA

La 20an de januaro en Pernik estis celebrata la 70a naskiĝtago de la revoluciulo-partizano kaj esperantisto Ivan Garvanov. Mortpafita de faŝistaj ĝendarmoj en 1944 j. La e-istoj de la loka E-societo „Nova vojo“ kaj el la distrikto ĉeestis ankaŭ la tuturban mitingon kaj metis florkronon antaŭ la granitan monumenton de Garvanov, troviĝanta en la centro de la urbo.



Naskita en familio de ministoj, jam en la gimnaziaj jaroj Ivan Garvanov estigis konscia komsomolano — sekretario de la Laborista Junulara Asocio (RMS) en sia naskiĝurbo Pernik. Tiutempe en Pernik loĝis kaj laboris la elstara partia gvidanto Nikola Kofargiev. Li okupigis pri la partia edukado de la juna Garvanov kiel sperta aganto de la komsomola organizo en Pernik.

Kiel lernanto en la Mekanika — Elektroteknika Lernejo en Sofio Ivan estis en la medio de progresemaj kunlernantoj kaj baldaŭ estis elektita sekretario de la abstulinula societo „Sobra Mekanikisto“. Li obstine legis verkojn de Marks kaj Engels, de proletaj verkistoj kaj klasikuloj, plialtigis sian klercon kaj



Parolas la prezidanto de BEA Ĥr. Gorov

La prezidanto de la loka E-societo „Progreso“ deklaris sub tondraj aplaŭdoj, ke estonte la societo portos la nomon de Hristo Kozlev.

Sekvis riĉa belarta programo. La varsajon „Nokto“ de Kozlev recitis la lernantino Rozalina Galunova. La junulara ensemble por politikaj kanzonoj ĉe la Kultura Domo plenumis la popularan romancon de Hristo Kozlev „Ĉu vi memoras“ kaj aliajn kantojn. Brila kulmino de la programo estis la muzika interpretado de belegaj, diverspopolaj muzikaj, plenumitaj kun altnivela majstreco de la konataj esperantistoj-kantistoj Marija Angelova, Dimitar Denĉev kaj la pianistino Sneĵana Barova.

Tiu kultura aranĝo kunvenigis pli ol 300 e-istojn kaj civitanojn, kiuj honoris la heroon Hristo Kozlev.

Ĥr. Manolov

kulturon.

Kune kun sia estonta edzino Vjara li vizitis kunvenojn de RMS kaj studrondojn, vizitadis la redakciojn de progresemaj ĵurnaloj, ofte kontaktigis kun scienculoj kaj verkistoj — komunistoj kiel Todor Pavlov, T. Samodumov, Mladen Isaev, prof. Asen Zlatarov k.a.

Pro partopreno en demonstracioj kontraŭ la regotenco li estis multfoje arestata.

En la komenco de 1932 jaro Ivan Garvanov, 21-jara, estas elektita sekretario de Distrikta Komitato de BKP. La juna familio Garvanov aktive partoprenas la kampanjon por liberigo de la elstara gvidanto de la internacia laborista movado Georgi Dimitrov el faŝista malliberejo.

Post la militservo Garvanov eklaboras en fervojista riparejo en Sofio. Tie li komencas eksterlegan agadon, organizas E-kurson kaj fondas abstulinulan societon. Faŝisma Germanio invadas en Sovetunio. Plifortigas la faŝista teroro. La polico konstante persekutas Ivan Garvanov. Oni provas aresti lin, pafas, sed Garvanov sukcesas eskapi. La sofia milittribunalo foreste kondamnas lin je morto. Je la 20a de marto 1944 en interpafado kun policistoj Ivan Garvanov mortigas sin por ne fali viva en ties manojn. Tiel finiĝis unu heroo vivo senrezerve dediĉita al la batalo por pli bona vivo kaj prospero de nia popolo.

• Nikola Mitev





## LA KOMENCO

En 681 estis kontraktita pactraktato inter la bulgara ĥano Asparuh kaj la bizanca imperiestro. Tio estis akto pri internacia agnosko de la nova ŝtato. De tiam devenas la oficiala tempokalkulo de Bulgario.

La Unua bulgara ŝtato, ekzistinta dum pli ol tri jarcentoj centre de la Balkana duoninsulo, postlasis neforviŝeblan spuron en la historio de la bulgara popolo kaj de la tuta eŭropa civilizacio. Tiu ŝtato, rebatante la senĉesajn atakojn de nordaj nomadaj triboj kaj rezistante kontraŭ la sudaj atakoj de la plej potenca imperio — la mezepoka Bizanco, ludis gravan rolon en la tempo de la frua eŭropa Mezepoko.

La ekzistado de la nova nacio, formiginta rezulte de kunfandiĝo de slavoj, prabulgaroj kaj antikvaj tracoj kaj nomata de la samtempuloj „bulgaroj“, fariĝis jam fakto.

Fine de IX kaj komence de X jc. la bulgara ŝtato atingis la kulminon de sia prospero kaj potenco. Tio estis la tempo, kiam kreiĝis ĝiaj skribo kaj spirita kulturo, disvastiĝintaj poste inter ĉiuj orientaj kaj sudaj slavoj.

En la profundoj de la socio en la periodo de la Unua bulgara ŝtato ekĝermis kaj flame disfloris religiaj kaj sociopolitikaj ideoj. Precipe per la bogomilismo\* ili penetris en Okcidentan kaj Mezan Eŭropon, donante puŝon al movado, kiu, venkinte la skolastikajn interdiktajn, liberigis vojon al spirita kaj sociala progreso.

La bulgaraj reĝoj estis mult-

flanke naturdotitaj personoj. Inter ili aparte distingigas la figuro de Simeono (894—927). La ambasadoro de la germana imperiestro en Konstantinopolo Liutprand skribis, ke „Simeono, elirinte el la monaĥeja kvieteco, enfalis en la ŝtorman vorticon de l' vivo“. Gis tiam li forlogiĝis pri logiko de Aristotelo kaj retoriko de Demosteno, studis la biblion, Homeron kaj samtempe ankaŭ „la kvar artojn“ de la orientklasikisma Renesanco — aritmetikon, geometrion, muzikon kaj astronomion.

Dum la dua duono de X jc. en Bulgario komenciĝis tio, kio okazis ankaŭ en la ŝtato de Karolo la Granda: la sociekonomia strukturo de la socio rezultigis malfortigon de la ŝtatpotenco, plifortigon de la potenco de lokaj feŭduloj, feŭdan dispecigon. Tio plifaciligis la taskon de Bizanco, kiu strebis al intensa centralizo.

Post ĉirkaŭ duonjarcento de post la morto de Simeono lian ĉefurbon eniris armeo de la bizanca imperiestro Johano Cimishij. Laŭ informoj de analisto li ordonis al la lasta reganto de Orienta Bulgario „demeti la simbolon de bulgara reĝpotenco — la purpuran ĉapon broditan per oro kaj perloj, la purpuran mantelon kaj la ruĝajn botojn“. La riĉege ornamitan kaj orplakitan faman preslavan ikonon de Plejsankta Dipatrino oni forportis kiel trofeon al Konstantinopolo.

Dum en Orienta Bulgario okazis tiuj eventoj, en Okcidento renaskiĝis la Unua bulgara ŝtato. La bizanca kronikisto Johano Skilica skribas, ke en Okcidenta Bulgario „bulgaroj

elektis kvaropon da fratoj — Davido, Moiseo, Aaron kaj Samuele kiel novajn regantojn. La saman fakton mencias ankaŭ alia kronikisto: „Eksciinte pri la morto de Cimishij la bulgaroj disponigis al al kvar fratoj regi super ili“. Baldaŭ regenestro de Okcidenta Bulgario fariĝis Samuele — unu el la plej grandaj personoj en la bulgara historio. La kulminon de sia majestoli atingis ĉe la limo de du jarcentoj (997—1001), kiam Bizanco ne povis haltigi la premon de liaj armeoj. Sed iom post iom Bizanco komencis prepari sin al reveno kun la Okcidentbulgara ŝtato. La decida batalo okazis en 1014. Imperiestro Vasilij la Dua, alnomita „Bulgaromurdinto“, militkaptis ĉirkaŭ 15000 bulgarajn soldatojn. Laŭ lia ordo ĉiuj estis blindigitaj kaj nur je ĉiuj cent soldatoj oni lasis po unu unuokula kiel gvidanton. Kiam Samuele vidis tion, skribas Skilica, li „ne povis supervivi sian ĉagrenigon kaj falis senkonscia. Lin trafis korkrizo kaj post du tagoj, je la 6a de oktobro 1014, li forpasis.“

Aŭtune de 1018 falis la lasta bulgara vojevodio. Fiera pri sia venko atingita en batalo, kiu daŭris tridek jarojn, la „Bulgaromurdinto“ reiris al Konstantinopolo. „Bulgario, taksata nealirebla, vasta, nevenkebla — skribas analisto Atalijat — ĉesis ekzisti.“

La Unua bulgara ŝtato estis frakasita. Sed restis la bulgara popolo. Dum la plej pezaj jaroj de la bizanca jugo ĝi batalis por restarigo de sia ŝtato. La batalo daŭris jarcenton kaj duonon, ĝis ĝi kroniĝis per fondo de la Dua bulgara ŝtato.

\* hereza kristana instruado kun progresema sociopolitika bazo, fondita en Bulgario dum X jc. de popo Bogomil.



## «APOSTOLO DE LIBERECO»

### EN ESPERANTO

grandan kvanton da arkivaj dokumentoj, memuaroj kaj aliaj materialoj, detale kaj kompetente analizis la historiajn faktojn kaj prezentis vastan panoramon de la vivo, la suferojn kaj la batalojn de nia popolo dum tiel grava epoko el nia historio. Si rakontas atentokapte kaj vivece, kun sincera amo kaj admiro pri la legendebla bulgara revoluciulo kaj serĉas plej varmajn vortojn por pentri lian veran bildon.

Tre ekvilibre estas analizitaj la diversaj faktoroj — historiaj, etnografiaj, ekonomiaj, politikaj, kulturaj, kiuj influis kaj formis la karakteron kaj la vivkonceptojn de Levski. Paĝo post paĝo ŝi pentras la etapojn de lia longa evoluo. Malgraŭ, ke Levski estis aŭto-didakto, lia penetrema koncepto pri la teorio kaj taktiko de la revolucio levis lin super la plimulton el la konataj liaj samtempuloj en Bulgario kaj eksterlande. Lia revolucia organizaĵo estis unika por tiu epoko. Ĝi havas internacian signifon kaj eĉ hodiaŭ ĝi povas inspiri kaj servi kiel modelo al tiuj popoloj, kiuj ankoraŭ ne venkis en sia batalo por libereco kaj justeco... Levski estis ne nur arda patrioto, sed ankaŭ modela internaciisto. Li neniam parolis kontraŭ la turka popolo, sed nur kontraŭ la sultana registaro. Li revis pri „sankta kaj pura respubliko“, kiu vivus en paco kaj amikeco kun ĉiuj najbaraj popoloj.

La stilo de la tradukinto estas simpla, facila, klara, flua, eleganta. Mankas mallerte kunmetitaj longaj vortoj kaj malnecesaj neologismoj.

Kelkfoje sub la influo de la angla lingvo estas uzitaj esperantaj vortoj kun la sama radiko kiel la anglaj, sed ne havantaj adekvatan signifon: diocezoj anst. eparkioj (p. 13 supre, sesio anst. kunsido (p. 246, p. 247 k. a.), statuto anst. statuso (p. 306) k.a.

Sed la supremenciitaj malgustajtoj tute ne influas al la alta kvalito de la traduko. Kvankam sufiĉe ampleksa, la libro tuj kaptas la atenton de la leganto kaj oni ne povas ĝin formeti antaŭ la finlego. Zorge presita sur bona papero, tole bindita, kun plaĉa ekstero, la libro digne okupos lokon en ĉies biblioteko.

En la tagoj de la 40a jubilea kongreso de BEA en Plovdiv sur la kongresa librostanto aperis nova libro en Esperanto: „Apostolo de libereco“ — portreto de Vasil Levski sur la fono de Bulgario de la 19a jarcento. Aŭtoro de la libro estas Mercia MacDermott, doktoro pri historiaj sciencoj, anglino, dediĉinta grandan parton de siaj sciencaj verkoj al la historio de la bulgara popolo. Tradukinto estas la elstara bulgara esperantisto-veterano Nikola Aleksiev, eksprezidanto de BEA kaj honora prezidanto de MEM, komitatano kaj honora membro de UEA. La esperanta eldono feliĉe koincidas kun la 13-jarcenta jubileo de la bulgara ŝtato (681—1981).

Por ĉiu bulgaro Vasil Levski, la plej kolosa figuro en la bulgara naciliberiga movado fine de la 60aj kaj komence de la 70aj jaroj de la pasinta jarcento, estas senmorta simbolo kaj modelo de pura, senprofita kaj sinofera revoluciulo. Oni legas kun granda plezuro la libron kaj trovas en ĝi multajn novajn faktojn, detalojn kaj pritaksojn. Des pli interesa kaj utila estas la libro por la eksterlandanoj, al kiuj estas adresitaj la angla kaj la esperanta eldonoj. Ĝi laŭ tre agrabila maniero helpas al ili pli bone ekkoni gravan periodon el la historio de nia lando kaj popolo.

La aŭtorino realigis tre konscie sian intencon. Si akurate kaj profunde esploris

„Apostolo de libereco: Portreto de Vasil Levski sur la fono de Bulgario de la 19a jarcento“ (1967), de Mercia MacDermott. Trad. N. Aleksiev. Sofia Pres, 1980. 359 p. Ilus. 21 sm. Bindita.

Neno Janev



BULGARA

ESPERANTISTA

KINOKLUBO

RESTARIGOTA

Ekde sia fondiĝo en 1961 j. la Bulgara Esperantista Kinoklubo disvolvis ege viglan agadon. Sub la titolo „Verdaj steloj super Sofio“ la filma teamo, gvidita de la prezidanto de BEK Dončo Hitrov, kreis 30-minutan filmon je 16 mm, nigra-blanka kinobendo, pri la 48a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio — 1963 j.

Dum la kongresaj tagoj BEK organizis internacian foto-konkurson kaj ekspozicion, kiujn partoprenis amatoroj el multaj landoj.

Pro multaj kaŭzoj la agado de BEK malpliiĝis kaj ĝi funkciadis sporade. Maloftaj estis la kunvenoj de ties membroj; la organiza kaj krea laboro fakte ĉesis.

Apenaŭ en 1978 j. anoj de la amatora E-kinoklubo el Gabrovo filmis laŭ sia iniciato, helpitaj de CE de BEA, la plej interesajn programojn de TEJO-Kongreso en V. Tarnovo kaj 63a UK en Varno.

Dum la kongresaj tagoj okazis jarkunveno de ILEF (Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-, Kino- kaj Magnetofon-Amatoroj), gvidata de k-do Hristo Gorov, prezidanto de BEA. La kunveno ankaŭ partoprenis prof. St. Bowitz (tiam respondeculo pri faka agado ĉe UEA) kaj multaj e-istoj — membroj de ILEF. En la nova estraro de ILEF estis elektitaj niaj samlandanoj Dončo Hitrov (prezidanto), Daniela Dečeva (sekretario-kasistino), Petko Arnaudov (magnetofona sekcio) Ognjan Keremidčiev (filma sekcio). Nia kolego Zdravko Nikolov el V. Tarnovo montris altnivelan majstrecon per siaj fotoj kaj fariĝis fotokorespondanto de UEA.

La ĝisnuna agado de BEK (kvankam neregula) pruvis sian celkonformecon kaj utilon por la E-movado kiel vigla kronikisto de E-aranĝoj kaj ties propagandisto en Bulgario kaj eksterlande.

Por aktivigi la agadon de BEK kaj restarigi ĝian aŭtoritaton, la ĝisnuna estraro alvokas ĉiujn e-istojn — kino-, foto- kaj magnetofon-amatorojn, kiuj dezirus renovigi sian membrecon aŭ estiĝi ties membroj, sendi konfirmiletojn al la adreso de Bulgara Esperantista Asocio — bul. Hristo Botev 97, 1303 — Sofio (por Bulgara Esperanto-Kinoklubo) kaj respondi la jenajn demandojn:

1. Nomo (propra, familia). 2. naskiĝdato. 3. naskiĝurbo (vilaĝo). 4. adreso (hejma aŭ ofica), telefono (hejma aŭ ofica). 5. profesio. 6. en kiu sekcio de BEK (kino, foto, magnetofono) vi deziras membri. 7. ĉu vi posedas propran kino-, foto- aŭ magnetofon-aparaton (se jes — kian fabrikmarkon).

Konsiderante la multajn landajn kaj eksterlandajn aranĝojn ĉi-jare PARE-VI kaj Internacia Medicinista E-Konferenco en Ruse, Revuo de la E-parolo kaj kanto en Pazarĝik k.a.), baldaŭ BEK alvokos organizan kunvenon. Estos elektita nova estraro kaj estos akceptitaj statuto kaj detala plano pri ĝia estonta agado sub la aŭspicio de ILEF.

Ni atendas viajn konfirmiletojn kaj viajn eblajn proponojn kaj sugestojn por renovigi la valoran aktivecon de la Bulgara Esperanto-Kinoklubo.

## BELARTA EKSPOZICIO DE VANKO BĀRDAROV

Antaŭ nelonge en urbo Botevgrad en la klubo de la kulturagantoj estis inaŭgurita la ekspozicio de nia fervora e-isto Vanko Bārdarov. Multaj grafikaj kaj pastelaj verkoj, kreitaj dum la lastaj jaroj estis kolektitaj kaj organizitaj en unu ekspozicion, bone reprezentanta nian amikon.

La intereso al la arto Vanko montras jam kiel infano. Li esprimadis siajn impresojn pri la ĉirkaŭa mondo per multaj desegnaĵoj. Lia impresema animo emociigas pro tio kaj li rapidas speguli ĝin sur folio



La instruistoj en la lernejo rimarkis la kapablon de Vanko kaj helpis lin. Poste en la mezlernejo en vilaĝo Kunino, distr. de Vraca, kie li studis la teknikon de ŝtonprilaborado, li daŭre pentris kaj sukcese partoprenis en lernejanaj ekspozicioj. Vanko provas siajn fortojn sur kelkaj kampoj de la arto: skulptado, pentrado, monotipografio k.a., sed la grafiko plej allogas lin.

En urbon Botevgrad Vanko venis antaŭ nelonge. Arda esperantisto, li tuj komencis laboron por restarigi la E-vivon. Kolektinte ĉirkaŭ si gejunulojn, li komencis gvidi kursojn, iniciatis fondon de E-societo, kies vicprezidanto li estis elektita.

Liaj temoj estas: vilaĝo, naturo, la intimaj animetemoj de la homo. Li pentras portretojn, pejzaĝojn. Aparte menciindaj estas liaj bildoj: „Portreto de Ivelina“, „Vintro en Varna“, „Malgranda nokta muziko“, „Tegmentoj“ „Vilaĝo Rumjancevo“, „Vintro“, „Aŭtoportreto“ k.a.

La modesteco de nia Vanko donas pli grandan valoron de liaj laboroj kaj arto. Lia ekspozicio estis freŝiga evento en la kultura vivo de Botevgrad kaj al ĝi manifestiĝis vigla intereso.

Ni tutkore ĝojas pri la sukceso de nia esperantistopentristo, pri lia kortuŝa arto kaj elkore tondeziras al li novajn, pli grandajn sukcesojn.

D. Dečev



# INTERNACIA TAGO DE LA VIRINO

## LA ĜARDENO DE LA REVOJ

Koro mia, vivu, vivu,  
vivu en la belĝardeno,  
la ĝardeno la plej kara —  
la ĝardeno de la revoj!

Ĝi ekzistas en la mondo,  
en mallumo de la noktoj,  
en la bildoj fantaziaj,  
en la bildoj de la sonĝoj.

Sonĝo mia, venu, venu,  
kiam la okuloj blindas,  
kiam la oreloj surdas  
pri la tera homa bru.

Prenu vi animon mian  
kaj forlugu ĝis la steloj,  
kun vi sentas mi la korpon,  
plumon kaj facilan venton.

Ho, ĝardeno de la revoj,  
ne forlasu min ĝis fino,  
ĉar parfumoj viaj puraj  
ne abundas sur la tero.

Penka Batoeva



## LA PLEJ DOLĈA BELO

Iu junulo, kiu sopiris je la plej dolĉa belo de la vivo, vekigis frue kun ekscitita koro. Li eniris en herbejon kaj lavis sin per la matena roso.

Super lia kapo sopire ekkriis vanelo, vokante lin ien. Li sekvis la vanelon kaj ekvidis sur la randoj de la pado ĝardenajn florojn. Ĉi tiuj floroj estis maloftaj, sed ili ne plu ravis lin, ĉar li sopiris je la plej dolĉa belo.

Ie malproksime en la arbaro ekkukuis kukolo logante lin. La pado malaperis en arbardensejo. Neviditaj floroj de superba beleco ĉirkaŭis lin. Li ekspiris ebbriigan parfumon. Densigis mallumo. Sekvante la vokon de la kukolo, la junulo traŝoviĝis kun peno antaŭen. Duonsveninte li ekvidis ruĝan lumon antaŭ si kaj proksimiĝis al ĝi.

Pro surprizo haltis lia spiro. Virina korpo svingiĝis kiel flamo. Ĉirkaŭ ĝi tente volvigis hararo, kovrante kaj malkovrante la plej sekretajn belajojn.

Siaj okuloj trapentris lin. Logante ŝi ekridetis al li. Stranga dolĉa parfumo fluis de ŝi. Lia korpo vertiĝis, liaj kruroj fleksiĝis.

„Jen estas la plej dolĉa belo de la vivo!“ — pensis li kaj kaptis per ambaŭ manoj la virinon.

Kiel pikita li ekkriis en hororo kaj detirigis. Iu grincis super li. Nokta birdo sidis sur alta nigra stumpo de rompita arbotrunko, en kies kavo bruletadis la medolo. De tempo al tempo

ruĝaj flametoj elsaltis eksteren kaj en ilia lumo la junulo ekvidis multajn serpentojn. Ili rampis el marĉejo kaj kun suprenlevitaj kapoj proksimiĝis al li. La siblado de la serpentoj hirtigis liajn harojn, la fetoro de la marĉo naŭzis lin.

Li ekaŭdis la vortojn de la strigo:

„Junulo, vi deliris, turnu vin kaj foriru!“

Li turniĝis kaj ekvidis en la malproksimo taglumon je grandeco de steleto.

Dronante en la marĉejo, batante sin kontraŭ la arbotrunkoj, li kuris stumblante al la lumeto. Ĝi proksimiĝis kaj kreskis. La arbaro finiĝis kaj li eliris en sunumatan herbejon. Alte en la ĉielo triladis alaŭdoj. En la herbo ĉirpadis lokustoj. Tra la trilado kaj ĉirpado aŭdigis la siblado de falĉilo.

La falĉilo sonadis interrompe, malfortaj estis la manoj de la falĉanto. La junulo vidis, ke falĉas milda junulino.

La falĉado por ŝi estis malfacila laboro, sed neniu helpis ŝin. Apud la neamasigita fojno kuŝis ŝia rastilo. La junulo iris al ŝi, prenis la falĉilon, donis al ŝi la rastilon kaj diris:

„Mi falĉos, vi restul!“

Ŝi danke alrigardis lin. La junulo vidis, ke ŝiaj okuloj ekbrilis kiel du sunetoj. Li komprenis, ke la plej dolĉa belo de la vivo kaŝas sin en ŝia tenera rigardo.

Arturs Kubulnicks  
(Sovetunios)



#### EN LA KORTO

Avo sidas,  
vidas,  
ridas:

nia flava  
koko brava  
pelas kokon de najbaro;  
kluke ĝojas kokinaro.  
Nun jam koko — la venkinto —  
staras sur palisopinto:  
„Ku-ka-re-ku!“ — fanfaronas  
ruĝe sur la kap' burĝonas,  
jen — papavo!  
Ridas  
avo.

#### ALUMETOJ — NE LUDILO

Alumetoj! Alumetoj!  
Ilon tenas jam fingretoj!  
Spurr! Fajreto!  
Jen, fajreto!  
Brulvundigis la fingreto,  
larmoj, krioj — kia bruoj!  
Kaj en nova robo — truo.  
Nun atentu, knabineto!  
ne ludilo — alumeto!

Elvira LIPPE  
(Sovetunio)

#### LA ĈEVALO DE LA INDIANO

En dezerto iu homo renkontis indianon. Ili ambaŭ rajdis ĉevalojn. Sed la ĉevalo de la indiano estis pli granda kaj pli bela. La alia viro estis pli bone armita, li do perforte forprenis la pli bonan ĉevalon de la indiano kaj lasis al li la sian. La indiano sekvis lin kaj kiam ili atingis la urbon, li iris al juĝisto kaj plendis kontraŭ la alia viro:

— Tiu ĉi viro forprenis mian ĉevalon kaj mi volas, ke li redonu ĝin al mi!

La juĝisto alvokis la duan rajdiston kaj demandis, ĉu tio estas vero. La viro respondis:

— Ĝi estas mia ĉevalo, mi mem bredis ĝin.

La juĝisto ne sciis, kion fari, ĉar la indiano havis nenion por argumenti. Li jam volis nuligi la proceson, kiam la indiano ekkriis:

— Tiu ĉi ĉevalo, estas mia kaj mi pruvos tion!

Poste li demetis sian ponĉon, vualis per ĝi la kapon de la ĉevalo kaj diris al la juĝisto:

— Se tiu viro asertas, ke la ĉevalo estas lia kaj ke li mem bredis ĝin, li diru, via juĝista moŝto, je kiu okulo la ĉevalo estas blinda.

Por montri, ke la ĉevalo estas lia, la dua viro rapide kaj senpripense diris:

— La ĉevalo blindas je la maldekstra okulo!

La indiano malvualis la kapon de la ĉevalo kaj diris:

— Rigardu, juĝista moŝto, li ne scias tion. Tiu ĉi ĉevalo tute ne estas blinda. Konvinkigu, ĝi estas tute sana. Tiu ĉi homo volis ŝteli mian ĉevalon.

La juĝisto konvinkigis, ke la ĉevalo vere apartenas al la indiano. Li ordonis al la trompanto redoni la ĉevalon kaj kondamnis lin al malliberigo.

Esperantigis: J. TOMIŠEK  
(ĈSSR)

## VELINGRADA ĈEESTO EN HUNGARIO

Dank'al ĝemelaj ligoj de E-societo „Stoju Kalpazanov“ en Velingrad kun hungaraj E-kluboj realigis partopreno de la junpionira E-blov-orkestro en la XIII Internacia Infana E-Tendaro en urbo Zanka ĉe Balatono.

La entuziasmaj blovorkestranj kun gvidanto Ivan Sergiev, estis premiitaj per tiu ekskurso fare de la lerneja estraro pro partopreno en la oficiala ceremonio ĉe la malfermo de la 40a Jubilea Kongreso de BEA en Plovdiv kaj la forte aplaudita koncerto antaŭ la plovdivaj civitanoj en la urba parko.

Zanka estas grandega junpionira urbeto, kies „loĝantoj“ — 3000! — estas nur geler-

nantoj diverslandaj kaj ties gvidantoj. Ĝi estas la dua laŭ grandeco en la mondo — post la infana ripozejo Artek (USSR). Zanka situas alonge en arbara sino je 2 km for de Balatono. Asfaltitaj aleoj, belaj trietaĝaj hoteloj kun moderna arkitekturo kaj komfortaĵoj, kun stadiono, grandega koncertejo, kovrita sporta halo, diversludaj sportejoj — vera infan-paradizo!

La somerumadon oni malfermis eksterordinare solene. Sub la sonoj de la hungara nacia himno, plenumata de infanaj blovorkestroj el urboj Debrecen kaj Miŝkolc, suprenigis la standardoj de Hungario, USSR, Bulgario,

Francio, Germanio, Pollando, Svedio kaj pluraj el Azio kaj Afriko. Ĉi tie somerumas infanaro el la tuta mondo.

Malene ni vekigis per agrabla kanto de birdoj. La melodio nesentible transiras en fabelan instrumentan muzikon, en infanan kanteton... Sub muziko ĉiu infano mem elektas ludojn.

Kvarfoje ni mangis, plus vespera sandviĉo. Dejoras junpioniroj en blankaj vestoj. Abundis ĉokolado, tre bongusta menuo. Seninterrompe estis ĉeenireja deĵorado — po du diversnaciaj infanoj.


En la programo de la tendaro estis multaj distraĵoj: popolmuzikaj koncertoj, blovorkestraj prezentoj, iluziistoj, tendara fajro,

interesa programo: kantoj, jonglaĵoj, teatra sceno, diapozitivaj. Kulmino de la vespero estis la bulgara popoldanco „raĉenica“, ĝin komencis lerni ĉiuj naciaj.

Neforgesebla restis la ekskurso, al urbo Topolca. Survoje — belegaj vilaoj, ripozdomoj, vinberkampoj, allogaj plaĝoj, fiŝkaptistoj!

Estis tago por sociitila laboro. Gaja diverslingva parolando eĥis sur la herbejo kune kun frapsonoj de laboriloj kaj agrablaodoro de freŝa herbo.

Laŭ la programo de la urbeto estraro okazis solenaĵo dediĉe al la paco. La placo, la tuta en mistera mallumo, eĥis pro la kantado de du kantistoj kun gitaroj, lumigitaj forte. La



Velingrada infana blovorkestro sub la gvido de I. Sergiev

ekskurso per ŝipeto tra Balatono, lekcioj pri la lago kaj ties flaŭro. Forte impresas la muzeaj kolektoj de Zanka. La stacidomo, kie deĵorantaj infanoj renkontas kaj adiaŭas la trajnojn per mansaluto. Estas muzeo de malnovaj vagonetoj kaj lokomotivoj, kiuj per sia miniaturo kaj beleco venigis nin al la infanfabeloj. Ĉi tie staras milita vagonaro, kiu rememorigas momentojn el la revolucia historio de Hungario. La atendejo de la stacidomo estas konstanta bildgalerio kun infanaj pentraĵoj, jam ekspoziciitaj en pluraj ĉefurboj (ankaŭ en Sofio).

Ce Balatono por ni mankis la sudbulgara Suno, tamen la plaĝo estis vizitata.

Plej agrablaj en la tendaro estis la vespero de nacioj. Ni, la bulgaroj, rajte fieris pri plej

kantoj, kvankam hungarlingvaj, evidente estis protestaj, kaj la homamaso dumila, eĉ plia, ekkantis. Subite lumiĝis grandega kinoekrano, aperis kadroj el la milito en Vjetnamio, kie bomboj de usonaj aviadiloj mortigis senkulpajn infanojn, virinojn, maljunulojn. Junpioniro voĉlegis telegramon al la Mondpaca Konsilio. Ni revenis al la tendaro, eksentinte la teruraĵojn de la milito, portante la optimismon de la pacama homaro.

Domage — venis la fino de nia somermado. Streĉaj adiaŭaj konversacioj, interŝanĝo de adresoj... Ni adiaŭis per kisoj kaj brakumoj, kun promesoj pri korespondado. La trajno ekveturis — centoj da infanoj manŝvingis: „Gis revido! Gis revido! Vivu ni, amikeco!“ Multaj ploris.

Ivan SERGIEV



# HISTORIAJ NOTOJ PRI KALKULTEKNIKO

En la Konferenco — Simpozio de IADEM (Internacia Asocio de Esperantistoj-Matematikistoj), okazinta en Budapeŝto, unu el la bazaj raportoj faris Petko Arnaudov el Bulgario.

K-do Arnaudov estas multjara E-aktivulo, sekretario de DE en u. Pazarĝik, instruisto de matematiko en la tiea matematika gimnazio.

Pro lia vigla E-aktiveco la CE de BEA dekoris lin per honora insigno kaj nomis lin „Elstara lektoro“ de E-o.

Ĉi-sube ni publikigas la mallongigitan raporton de P. Arnaudov.

La kalkulotekniko antaŭ ĉio estas aŭtomata tekniko. Samtempe ĉiu aŭtomato funkcias surbaze de la programo, do surbaze de iaj anticipaj kalkuloj kaj utiligo de iliaj rezultoj.

La motivo por konstruo de aŭtomatikajoj ĉiam estis ĉu por iaj praktikaj celoj ligitaj kun la ĉiutaga krea laboro de la homo aŭ kun la kulturaj bezonoj, ĉu por amuzigo, t. e. por spiritalaj bezonoj. Jen kelkaj ekzemploj.

En 390 jaro antaŭ la nova erao Arĥitas de Tarenta faris flugantajn mekanikajn kolombojn, celante amuzigon. 300 jaroj antaŭ la nova erao Filon priskribas aŭtomaton, kiu vendas sanktigitan akvon. La aŭtomato funkcias la pezo de monero kun fiksita valoro. Tiuj estas la unuaj prototipoj de la nuntempaj surstrataj aŭtomatoj por vendado de frukto-sukoj, sandviĉoj k. a. Ĉirkaŭ 280 jaroj antaŭ nia erao reĝo Ptolemeo mirigis siajn gastojn, montrante al ili homon-aŭtomaton, kiu sidas, manĝas, trinkas ktp. En la 2a jarcento a. n. e. Ktesibios faris la unuan akvan horloĝon.


En 875 j. ni jam havas sufiĉe perfektan aŭtomaton, modelan ekzemplon de la „kalkula“ tekniko — modelo de ĉiela sfero, kiu moviĝas. Abu Kasim, konstruisto tiun unuan planetaron. Ankoraŭ pli poste Leonardo da Vinĉi konstruis leonon, movigantan kaj jetantan florbukedojn. La franca horloĝisto Dro konstruis knabon, kiu skribas, alian, kiu pentras ktp. En Moskvo similajn aŭtomatojn faris la majstro-teknikisto Djuĉolin. La franco Vokason konstruis la aŭtomatan teksilon, konatan kiel „La teksilo de Jakard“.

En 1642 j. la matematikisto Paskal konstruis la unuan kalkulmaŝinon, kiu estis utiligata en la praktiko. Post li kalkulmaŝinojn faras Lajbnic, Odner, Ĉebisev k. a.

En la unua duono de nia jarcento estis farita la unua rapide funkcia elektronika kalkulmaŝino. Ĝin konstruis en USA la bulgaro Ĝon Atanasov. Lia patro estas el vilaĝo Bojagik, distrikto de Jambol, Bulgario, naskita en 1876. Kun sia onklo, 13-jara, li forveturas al USA, ŝtato Aĵova. En la komenco de la jarcento naskiĝis lia filo Ĝon, kiu kreskis kiel sciama knabo. En 1925j. Ĝon jam estas magistro kaj en 1930j. — doktoro pri teoria fiziko. Li laboras je temoj de la kvanta mekaniko, elasteco, la fiziko de la kristaloj kaj ĉiutage devis solvi lineajn partajn diferencajn ekvaciojn, kondukantajn al sistemoj de lineaj algebraj ekvacioj. Unue li laboras sola kaj en 1939j. kune kun Klifard Beri konstruas sian unuan kalkulmaŝinon elektronikan por adicio kaj subtraho. Sed ne estis homo, kiu finencu la produktadon de la maŝino. Dume en 1940j. pri liaj laboroj ekinteresiĝas Ĝon Mogli, Ĝon Ekart-juna kaj Buŝ. En 1943 j. Buŝ konstruas novan elektronikan maŝinon, nomitan Kupidon, destinitan prservi la defendon de la germanaj raketoj „Faŭ“. Du jarojn poste, en 1945, Mogli kaj Ekart konstruas „Eniak“ — rekonitan kiel la

unua vere funkcia elektronika kalkulmaŝino. Tiutempe (en 1943 j.) Norbert Viner kreas la novan sciencan, proklamitan ankoraŭ de Amper ĝuste antaŭ 100 jaroj — la kibernetikon. La rapidega evoluo de la ekonomio, de la tekniko kaj amasa produktado, la bezonoj de diversaj sciencaj esploroj kaj ĉefe la kosmaj, provokis ege rapidan progreson de la kalkulotekniko kaj nun ĝi estas aplikebla en ĉiuj sferoj de la socia kaj ekonomia vivo de nia planedo. Sen ĝi neniu aŭtomatigo de la produktado estas ebla.

En la evoluo de la rapide funkcia kalkulotekniko (koncize: aŭtomata kalkulotekniko — AKT) oni jam povas noti kelkajn generaciojn, kvankam ĝi estas tiel juna.



— Saluton! Ĉu vi parolas Esperanton?! . . .

La unua generacio de aŭtomataj kalkulmaŝinoj (AKM) estas tiu, ĉe kiu la portanto de la informoj estas elektronikaj lampoj. Ĉe la dua generacio AKM la portanto de la informoj jam estas transistoroj.

La tria generacio de AKM posedas kiel portanton de informado „integralajn skemojn“.

Estas ankaŭ kvara generacio de AKM kun portanto de la informado—diversaj mikroelementoj, kristaloj ktp. Rilate al la priskribo ĉe ili estas reveno al la unua generacio kaj 70% de ilia prezo formas la matematikajn asekuro.

Hodiaŭ estas ege malfacile nombri ĉiujn sferojn de homa agado, kie estas aplikata la kalkulotekniko, kaj la plua progreso de la homaro sen ĝi estas neimagebla.

# SALUTLETEROJ AL SOVETAJ JUBILEULOJ

Al k-do S. Podkaminer — Leningrado

## KARA KAMARADO PODKAMINER,

La Centra Estraro de BEA je la nomo de ĉiuj bulgaraj esperantistoj plej kore salutas Vin lige kun Via 80-jara jubileo.

En Via personeco ni salutas la meritplenan veteranon de la soveta esperantista movado, iaman estraranon de SEU kaj nunan vicprezidanton de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, elstaran funkciulon kaj tecriulon de Mondpaca Esperantista Movado, ardan adepton de soveta-bulgara amikeco kaj ŝatatan amikon de bulgara esperantistaro.

Ni plezure deklaras Vin Honora Membro de BEA kaj distingas Vin per honora insigno kaj diplomo.

Ni sincere bondeziras al Vi fortikan sanon kaj longan vivon por plua vigla agado en la vicoj de la soveta kaj internacia Esperanto-movadoj!

Al k-do S. Krajinov — Moskvo

## KARA KAMARADO KRAJNOV,

Okaze de Via 75-jara jubileo ni salutas Vin kaj en Via personeco la elstaran veteranon de la soveta Esperanto-movado, konatan aganton de la Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj.

Bonvolu akcepti la titolon Honora Membro de BEA kun honora insigno kaj diplomo.

Vivu longe kaj laboru daŭre por la triumfo de la soveta-bulgara amikeco kaj la ĉiam pli intima kunlaborado de la esperantistoj de niaj frataj popoloj!

CE de BEA

Ĝenerala sekretario: Prezidanto:

Kunĉo Vălev  
Sofio, Ĥristo Gorov  
januaro 1981

## KORAN DANKON

Al la Centra Estraro de BEA  
Sofio

Karaj amikoj kaj fratoj!

Mi estis tre emociita ricevinte vian gratulleteron okaze de mia 80-jariĝo kaj decidon honorigi min per la honora membreco de BEA — la avangarda kaj la plej aktiva E-asocio en la mondo. Mi vidas en tiu ĉi honorigo la simbolon de amikeco kaj frateco, kunliganta esperantistojn de Bulgario kaj Sovetunio, same kiel niajn ambaŭ popolojn.

ANKORAŬOJE MI KORE DANKAS AL VI.

Frato via,

S. Podkaminer

# TRA SOVETUNIO

ĈIULANDAJ PACPROPAGANDILOJ SERĈATAJ

Samarkanda E-klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn propacajn propagandilojn: afiŝojn, sloganojn, flugfoliojn fotojn, desegnaĵojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn, protestkanojn, insignojn, glumarkojn k.a. Krome estas akceptataj ĉiuspecaj materialoj, alvokantaj al mediprotektado, amikeco, internacia kunlaboro, interkompreniĝo kaj aliaj mondscale gravaj temoj.

Laŭdezira rekompenco en formo de libroj, revuoj, bildkartoj, sondiskoj, diapozitivaj, memorajoj ktp. garantiita!

Bonvolu adresi ĉion al: Samarkanda E-Klubo de Interpopola Amikeco, SU-703 000 Samarkando, glavpoŝtamt, p.k. 76, Uzbekistano, USSR

## TAGO DE BULGARIO EN MINSK

Zorgante pri internacia edukado de gejunuloj la E-klubo en u. Minsk aranĝis tagon pri Bulgario. Partoprenis ankaŭ gastoj el Celjabinsk. Raporto pri Bulgario kaj la bulgara E-movado, rakontoj de vizitantoj pri Bulgario, informoj pri la bulgara poezio kaj teatro, korespondadoj de bulgaraj e-istoj, kantado de bulgaraj kantoj, k.a. vekis grandan intereson ĉe la ĉeestantoj. Ne mankis teatraĵeto pri Bulgario. Celjabinskaj gastoj ankaŭ partoprenis la programon sur la scenejo dediĉe al bulgaraj dolĉaĵoj. La kunveno estis ornamita per sloganoj pri soveta-bulgara amikeco, estis aranĝita ekspozicio de bulgaraj libroj kaj revuoj en E-o.

La vespero ege plaĉis al la partoprenintoj, precipe al la novaj e-istoj, kiuj eksciis multon pri la vivo en frata Bulgario, pri la komuna batalo de niaj popoloj por libero kaj homa feliĉo.

## EKSPOZICIO DEDIĜE AL LA BULGARA JUBILEO

La E-klubo ĉe la universitato en u. Kujbiŝev (USSR) organizos ekspozicion okaze de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. Ĉiuj e-istoj estas petataj urĝe sendi materialojn pri la bulgaraj-sovetaj rilatoj: fotojn de monumentoj, stratoj kaj lernejoj, artikolojn librojn, afiŝojn. Ĉiu kontribuinto ricevos belajn prilongajn memorajojn. Adreso: Valentina Sarabkova, SU-413 110 Kujbiŝev, pr. Lenina 14-253, USSR.

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) organizos en 1981 ekspozicion okaze de ĝia 25-jara datreveno. Bonvolu sendi novajn kaj malnovajn E-ajojn, E-ŝlosilojn, lernolibrojn, vortarojn, faldfoliojn ktp. Adresoj: VPEA, 107 Quan Thanh, Hanoi; VPEA-sekcio, k-do Nguyễn do Khanh, 173 A Vo Van Tan, Ho Chi Minh, Vjetnamio.



*Delando  
al lando.*

## HISPANA ESPERANTO-MUZEO

En Sant Pau d'Ordal, gaja vilaĝeto el Penedès, je 12 km de Vilafranca del Penedès kaj je 38 km de Barcelona suden en la direkto al Valencio, troviĝas la Hispana Esperanto-Muzeo.

La muzeo estis inaŭgurita en 1968 j. okaze de la X Barcelona Esperantista Renkontiĝo. Tiam la muzeo loĝiĝis en ampleksa ĉambro de la apoteko de la fondinto Hernandez Izal, kiu laboras en tiu ĉi vilaĝeto kiel apotekisto.

Post kelka tempo la materialo, kolektita dank'al malavareco de la e-istoj, estis tiel granda, ke oni decidis konstrui novan domon, nur por la muzeo, kaj tiamaniere arigi la tutan materialon en taŭga sidejo.

La nova domo, situanta en strato D-ro Zamenhof 12, estas sufiĉe ampleksa — 250 kvadratajn metrojn — kaj konsistas el granda salono-biblioteko, laborĉambro, granda kunvenoĵo, salono por vizitantoj kaj magazeno por ripetatoj kaj por ekspedado de materialoj por interŝanĝado kun aliaj muzeoj kaj bibliotekoj.

En la muzeo oni kolektas ĉion rilatantan al Esperanto kaj al la historio de la E-Movado. Do la biblioteka kolektado estas la plej grava afero. En ĝi estas ordigitaj kaj klasifikitaj libroj, gazetoj kaj turismaj broŝuroj. La muzeo havas pli ol 2200 gazetajn jarkolektojn.

Apartaj kolektoj temas pri: fotoj de esperantistoj



aŭ esperantaj arangoj; kongresaj medaloj, insignoj kantoj ktp.; ex-librisoj de e-istoj, murafisoj pri kongresoj foiroj aŭ kursoj de E-o; moneroj, flagoj de malaperintaj societoj; poŝtkarto skribitaj de malnovaj e-istoj; muzikaj, eltranĉoj de naciaj gazetoj pri E-o, rememoroj pri E-kongresoj aŭ iu ajn E-agado.

Ĉiuj esperantaĵoj, estas bonvenaj kaj allogas kolektojn en la muzeo, ĉar ĉio ĉi estas utila por la historio de E-o.

L. Hernandez

## ESPERANTO KAJ FILMARTO

En Karlovy Vary, ĈSSR, ĉiun unuan semajnon de oktobro okazas „Tourfilm“ — komerca festivalo de turismaj filmoj, kiuj ankaŭ celas propagandi la servojn liveratajn de vojaĝoficejoj. Okaze de „Tourfilm—1979“ la lokaj e-istoj eldonis propagandan folion „Esperanto — internacia lingvo de filmo“.

En 1980 okaze de la sama evento ili aranĝis en konvena loko vitrinon sub la devizo „Mondo de turismo — mondo de interkompreniĝo“. Estis ekspoziciitaj turismaj E-prospektoj „De Karlovy Vary ĝis Brazilo“. Samtempe estis propagandataj la servoj de Monda Turismo kun indiko, ke la organizado helpas pri turismaj kontaktoj al la E-parolantoj: „Ankaŭ vi povas utiligi ĝiajn servojn, se vi ellernas E-on kaj membrigos al Ĉeĥa E-Asocio“. En la vitrino estis lokita afiŝo pri nova kurso de E-o en Karlovy Vary 1980/1981. La spirita kunligo de la turisma motivo de „Tourfilm“ kun E-o vekis certan intereson ĉe multaj preterpasantoj.

**Rimarko:** Ni salutas la agadon de la e-istoj en K. Vary. Ilia utiligo de konvena evento por konkreta propagando de la lingvo kaj varbado de kursanoj devas esti ekzemplo por ĉiuj E-organizantoj. Ni ŝatus ricevi similajn materialojn por publikigo.

## NOVAĴOJ

**La Lingvosciencia Instituto de la Scienca Akademio de Sovetunio** akceptis du doktoriĝajn tezojn pri interlingvistiko, de Dina Lukjanec kaj Boris Kolker. Scienca gvidanto estas prof. d-ro M. I. Isajev.

En Figeac (Francio) Solen Gaspard kaj Arno Lagrange, antaŭaj membroj de TESP (Teatro Esperanto Parizo), fondis novan teatran trupon „La Krizalido“ kun celo organizi spektaklojn en E-o kaj en la franca lingvo.

**La Pola Radio (Varsovio)** la 16an de januaro, je la 7a horo matene elsendis la 20 000an E-disaŭdigon.

Fine de la pasinta jaro ekfunkciis en Estonio (Sovetunio), enkadre de la kleriga ministerio, komisiono pri esperantlingva literaturo.

**La Brazilia Poŝta Administracio** definitive decidis eldoni specialan poŝtmarkon okaze de la Universala Kongreso en Brazilio. Ĝi aperos la 25an de julio koincide kun la inaŭguro de la kongreso.

En Krasnodar (Sovetunio) E-o estas akceptita kiel oficiala studobjekto ĉe la ŝtata universitato, fakultato pri sociaj sciencoj.

En Svislando en la programero „La anteno estas via“ de la romanda televido okazis 20-minuta elsendo pri E-o. Ĝin pliriĝis kaj fermis kanzonoj de Olivier Tzaut.

## SOLVO DE LA TESTO „ĈU VI HAVAS BONAN IMAGON?“

1. La horloĝo montras 12 kaj kvaronon. La brakhorloĝoj estas portataj ĉiam sur la maldekstra brako kaj ilia streĉilo troviĝas ĉiam dekstre.

2. La tableto estas kvadrata. Se ĝi estus ronda, ĝiaj piedoj devus stari iom interne, por ke ĉiuj kvar povu esti enskribitaj en la cirklo.

3. La ŝuo estas maldekstra. La bukoj ĉiam staras je la ekstera flanko por ne ĝeni la piedon dum irado.

4. La du duonoj de la skatolo ne estas egale dikaj, do tio ne povas esti ŝakskatolo. La du duonoj ne povus formi ebenan platon. Krome ĉe vera ŝaktabulo en ĉiu linio estas po kvar blankaj kaj kvar nigraj kvadratoj.

5. La dekstra kulero estas pli malpeza ol la maldekstra. La linioj sur ĝi montras, ke ĝi havas kavaĵeton, do ke ĝi estas gofrita, kaj tion oni faras nure sur objektoj, ellaboritaj el maldiktavolaj materialoj por pliigi ilian fortecon.

14 samideanoj el Bulgario kaj el eksterlando sendis al ni solvon de la tasko. Korekte respondis K. Istomin (USSR), N. Hristov (Bulgario), O. Krasnikov (USSR), R. Pavlov (Bulgario), B. Venislovas (USSR).

Inter ili ni lotumis libropremion. Ĝin gajnis Rumen Pavlov el u. Veliko Tarnovo (Bulgario).

### Solvo de la krucvortenigmo en n-ro 11/1980:

Horizontale: 2. mal. 4. kokono. 5. parabolo. 7. odo. 9. uro. 12. volumo. 13. vipuro. 14. oni. 16. ondo. 17. Senegalo. 20. banano. 21. baso.

Vertikale: 1. kakao. 2. moro. 3. lobo. 5. poliso. 6. lupolo. 7. ovo. 8. dono. 10. runo. 11. ordo. 15. senato. 18. nabo. 19. gaso.

### KOREKTO

En n-ro 1/1981 de „BE“ en la artikolo „Britoj aplaudis Prodanov“ sur paĝo 11 estas iuj malĝustaj, kiujn la redakcio deziras korekti.

K-do Prodanov vizitis Briton ne kiel „privata turist“, sed li estis oficiale komisiita de BEA kiel plenpovanta de kulturaj taskoj: koncertoj, prelegoj, interŝanĝo de sperto ktp.

Keswick Hall College of Education ne estas „mezlernejo“, sed Altranga Pedagogia Instituto en la sistemo de la Universitato en u. Norwich, kiu pretigas instruistojn por mezlernejoj. S-ro Antony Cartwright havas sciencon rangon docento kaj estas edukito de l'Kembridge Universitato.

En la improviza ekspozicio de k-do Prodanov en u. Norwich estis ne nur pentraĵoj pri Bulgario, sed ankaŭ pri rimarkindaj el diversaj eŭropaj landoj kaj urboj.

La redakcio petas pardonon pro la allasitaj eraroj.



DEZIRAS  
KORESPONDI

### BULGARIO

Ivan Gjuzeev, bul. „Petko Todorov“ bl. 11, v.h. A, BG-1408 Sofio (47-jara oficisto deziras interŝanĝi poŝkalendaretojn)

### HUNGARIO

Őszli Erika, Cifrakapu utca 37 VII/3, 3300 Eger (20-jara, kun esperantistoj 20–30-jaraj el Varna).  
Szel István — Lóránt u. 22, 1125 Budapest (26-jara naturamiko, ekskursgvidanto, ŝatas marŝadi surmonte).

### SOVETUNIO

Ŝostak Jaroslav, str. Karpenko 13/13, Ternopol (25-jara studento — kun gebulgaroj pri ĉt, kolektas bk)  
Briljov Genadi, str. Galilja 4/4, SU-173003, Novgorod-3 (31-jara fervojisto — kun gebulgaroj)  
Bodnar Oksana kaj Nikolaj, str. Kalinina 8/2, SU-281900 Kamenec-Podolskij (juna E-familio — kun ĉt pri ĉt)

Kreminskij Vladislav, elektristo, 26-jara;

Gorodeskaja Alla, studentino, 22-jara;

Macjuk Nataša, oficistino, 18-jara;

Ŝemeta Tamara, instruistino, 40-jara;

Ŝemeta Svetlana, oficistino, 18-jara;

Komuna adreso: Dom kulturi, str. Ŝevĉenko 20, SU-281900 Kamenec-Podolskij;

Gelernanta E-grupo (15–17-jaraj) deziras korespondi tutmonde. Adreso KID „Prometej“, Esperanto, Sovhoz — tehnikum, str. Leningradskaja 109, SU-281900 Kamenec-Podolskij.

Ziaunys Gintaras — Ŝemaitijos 9–25, 235500 Mažeikiai (15-jara lernanto, dez. kor. tutmonde).

Zelenova Irina — ul. Telmana 50, 344010 Rostov-na-Don (17-jara lernantino kun samaguloj, pri fremdaj lingvoj kaj E-to, populara muziko, fotoj de kinoaktoroj, vojaĝoj, trikado).

Tulupov Aleksandr — P. K. 2938, 660010 Krasnojarsk (22-jara, dez. kor. tutmonde pri ĉt).

Viktor Söniss — Aravete, Palde, 202835 Estonio (26-jara, dez. kor. tutmonde kun kolektantoj de gramofondiskoj).

Kontun Leonido — str. 23 Aŭgusta 77, ap. 6, 310018 Ĥarkov (24-jara instruisto de ukraina lingvo, pri muziko, literaturo, esperantajoj).

Korobčuk Igor — str. Ĉelinogradskaja 50, 310113 Ĥarkov (21-jara, studento de konservatorio, pri muziko, literaturo, esperantajoj).

Olincin Anna — str. Topolna 13<sup>a</sup>–261, 290059 Lvovo (20-jara, dez. kor. tutmonde pri ĉt).

### NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

La 2an de decembro 1980 forpasis subite en Sofio nia samideano

STEFAN MARINOV HRISTOV,

ĉefkontisto de la Internacia E-Kursejo. Niajn kondolencojn al la funebranta familio!

Reveninte al Bulgario post longdaŭra loĝado en Usono, subite forpasis je la 13a de oktobro p. j. en Sofio

D-ro STEFAN IVANOV ĈOBANOV

64-jara, naskita en v. Tulovo, distrikto de Stara Zagora.



## МЕЖДУНАРОДНА ЕСПЕРАНТСКА ШКОЛА

1090 София, п. к. 791 (бул. „Хр. Ботев“ 99)

тел. 32-40-68

## С ЕСПЕРАНТО В ПОЛША, УНГАРИЯ, ГДР И ЧЕХОСЛОВАКИЯ ПРЕЗ 1981 Г.

Международната есперантска школа в София организира групи за участие в различни есперантски прояви в Полша, ГДР, Чехословакия и Унгария през 1981 г. по следните маршрути:

1. Седмица на международното приятелство в гр. Пейч, Унгария: От 26 февр. до 4 март при маршрут София—Букурещ—Будапеща—Пейч и обратно, с пренощуване в Будапеща общо 7 дни — 130 лева.

2. Международна есперантска фолклорна среща в гр. Торун, Полша: От 27 май до 5 юни с маршрут София—Лвов—Варшава—Торун—Бидгощч—Познань—Прага—Будапеща—Букурещ—София, общо 10 дни — 200 лева.

3. Международна есперантска среща в Бидгощч, Полша. От 31 май до 10 юни с маршрут, както в т. 2 при общо 11 дни — 200 лева.

4. Международен летен есперантски университет в Гюла, Унгария: 3—13 юли, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Гюла и обратно, с разглеждане на Будапеща и Букурещ, общо 11 дни — 210 лева.

5. Международен детски есперантски лагер в Токай, Унгария през м. юли, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Токай и обратно, с разглеждане на Букурещ и Будапеща, общо 18 дни — 220 лева.

6. Международен есперантски понерски лагер в Занка, Унгария: през м. юли, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Занка и обратно, с разглеждане на Букурещ и Будапеща, общо 18 дни — 270 лева.

7. Международна природолюбителска есперантска среща в Абалигет, Унгария: 18—31 юли, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Абалигет и обратно, с разглеждане на Букурещ и Будапеща, общо 14 дни — 240 лева.

8. Международни летни есперантски курсове в Егер, Унгария: 31 юли — 15 август, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Егер и обратно, с разглеждане на Букурещ и Будапеща, общо 18 дни — 260 лева.

9. Международни есперантски курсове в Ланцов, Чехословакия: От 3 до 20 юли, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Прага—Ланцов и обратно, с разглеждане на Прага и Будапеща, общо 18 дни — 240 лева.

10. Международни летни есперантски курсове в Кошице, Чехословакия: 9—26 юли, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Кошице—Попрад и обратно, с разглеждане на Попрад и Будапеща, общо 18 дни — 250 лева.

11. Международна есперантска туристическа седмица в Кошице, Чехословакия: 22 юли до 1 август, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Кошице—Попрад и обратно, с разглеждане на Попрад и Будапеща, общо 11 дни — 170 лева.

12. Международен есперантски семинар в Берлин, ГДР: 12—26 септември, маршрут София—Букурещ—Будапеща—Прага—Берлин и обратно, с пренощуване в Прага и Будапеща, общо 15 дни — 260 лева.

13. Международен туристически есперантски панаир във Варшава, Полша: 16—28 октомври, маршрут София—Лвов—Варшава—Прага—Будапеща, с разглеждане на Прага и Будапеща, общо 13 дни — 240 лева.

14. Новогодишна международна есперантска среща в Будапеща: 27 декември 1981 г. — 4 януари 1982 г., маршрут София—Букурещ—Будапеща и обратно, с разглеждане на Букурещ и новогодишен бал — 230 лева.

15. Новогодишна международна среща в Гданск, Полша: 27 декември 1981 г. — 8 януари 1982 г., маршрут София—Букурещ—Лвов—Варшава—Гданск—Прага—Будапеща—Букурещ—София с пренощуване във Варшава и разглеждане на Прага и Будапеща, общо 13 дни — 270 лева.

Всички групи тръгват от централна ж. п. гара София и пътуват предимно със спален или кушет вагон. По пътя имат осигурена суха храна.

Джобни пари за Полша се предоставят до 100 лв., за другите страни по 30 лв.

Сумите за такси и за обмяна се превеждат на адрес: 1090 София, с/ка 185/3025 ДСК-3, за Международна есперантска школа.

Документи: молба-декларация и по два отрязъка статистически листове се изпращат на адрес:

1090 София, п. к. 791, Международна есперантска школа. Справки на тел. 32-40-68.